

Raporto de Mirejo pri shia esplor-vizito en Zaozhuang universitato kaj Esperanto-muzeo. En provinco Shandong, lando Chinio.

La vizito okazis la 8-an de novembro 2016

Ene de la diversaj EO-centroj estas kunvenejoj, konservejoj kaj muzeoj. Do tiu de Zaozhuang apartenas al tia kategorio de institucioj. Mi volas unue priskribi la diversajn kriteriojn kaj aspektojn en rilato kun la situo de Esperanto-centroj ĝenerale. En gravaj grandaj landoj kiel Chinio kun plurmiliono chefurbo tia centro dronus en la chefurbo. Pro tio estas favora aspekto, ke tia institucio ne estu en la chefurbo. Sama komento valoras ekzemple por CDELI en La Chaux-de-Fonds, Svislando (tamen ne granda lando): siatempe oni rekomendis al Sinjoro Gacond ne meti CDELI-n en Ghenevo au Lausanne, kie ekzistas multaj diversaj institucioj kaj kie CDELI dronus inter ili. Tute alia situacio estas en evolulandoj, kie la kultura vivo chefe aktivas en la chefurbo. Iu centro nepre estu en la chefurbo por ekzisti. Pro tio mi ne povas pozitive komenti la situon de Afrika Oficejo en Lokossa, Benino, same kiel la EO-centro en Rumonge, Burundo. En tiuj du lokoj okazis la decido meti la centron tie sen esploro, analizo kaj pripenso; en la kazo de Afrika Oficejo tio okazis tiel pro historiaj kialoj. En la kazo de la centro en Rumonge la deziro de rumonganoj estis forta kaj Sinjoro Derks sekvis kaj subtenis.

La urbo Zaozhuang situas sude de Pekino. El la stacidomo Pekino Sudo veturas rapida trajno. Post 2 horoj kaj duono oni atingas la urbon Zaozhuang. Plie la urbo situas en la plej loĝhata parto de la lando, en egala distanco al Shanghai. Do la centro estas facile atingebla por ĉinoj kaj eksterlandanoj. La urbo havas proks. 4 milionojn da loĝantoj, temas pri mezgranda ĉina urbo. La universitato havas proks. 18000 gestudentojn. Estas la ununura universitato en la urbo.

Oni diris al mi, ke la universitato estas sufiche nova, sen granda prestiĝo. Pro tio la gvidantoj de la universitato vidas la eblon akiri prestiĝon tra Esperanto. Tio estas konsiderinda fakto.

Pro la nova linio de rapida trajno oni konstruis novan stacidomon en la urbo en loko, kiu nun estas iom fora de la malnova urbocentro. Pro tio nun naskiĝas nova urbocentro moderna che la nova stacidomo. En tiu nova centro la universitato ricevis terenon duoble pli grandan ol la nuna surfaco. La decido okazis en la sama momento kiel mia vizito. El tio oni komprenas, ke la surfaco de la universitato triobliĝos. La muzeo translokighos al tiu nova loko kaj akiros pli da surfaco ankau. La novaj konstruajhoj ekuzighos en 2018.

La muzeo estas fako de la universitato. La Shtato disdonas monon por muzeoj, la universitato ricevas subvenciojn por la EO-muzeo. La gvidantoj tre favoras kaj subtenas la muzeon. La fondoĵaro de la muzeo estas 2013.

Mi renkontis la gvidantojn jam en Buenos Aires en 2014. Inter ili estis Sinjoro SUN "Semio", la motoro de la muzeo. Li parolis tiam jam, ke ni devus antaŭvidi pashon por firmigi la ekziston de la muzeo per kontrakto kun la universitato, urbo, provinco kaj Shtato. Li organizis mian viziton en 2016.

La muzeo havas diversajn salonojn. Chiu salono havas sian precizan temon. Oni rondiras de salono al salono. Plie la muzeo havas kunvenchambron kun proks 30 sidlokoj en vicoj kiel en kinejo. Apude estas konservejo kun 10 movshrankoj. La muroj estas blankaj kaj verdaj. La ĝenerala prezento estas rezulto de la laboro de la gestudentoj en arta fakultato de la universitato. La

decidoj pri kion prezenti kaj la kolektado de la materialo estas rezulto de la laboro de Sinjoro SUN. Apud la muzeo Sinjoro SUN havas laborchambron. Plie en la universitato mem li havas laborchambron ankau.

La taskoj de la institucio estas informi, lertigi, konservi. Informi per malfermiteco de la muzeo al la publiko. Lertigi per surlokaj kursoj kaj seminarioj. Konservi per kolekto de libroj, revuoj, dokumentoj, artajhoj, sonbendoj, diskoj, insignoj. La libroj estas novaj, antikvaj au brokantaj. Ne estas libroservo. La muzeo kolektas la numerojn de proks 100 revuoj. Sinjoro SUN abunde skanas fotojn. La enretigo de la havajho estas survoje.

La personaro konsistas el 8 plentempaj postenoj.

En la nova muzeo povos esti chambro por ILEI kaj UEA.

En la nova muzeo la malfermaj horoj estos tra chiuj tagoj de la semajno.

Fine de la vizito okazis solena konkludo kun la direktoro de la universitato en unu flanko de la tablo kaj Mirejo kaj Sinjoro Pak je la alia flanko. Sinjoro Pak estas el Koreio, profesoro en tiu universitato kaj altnivela esperantisto. La sidlokoj estis indikitaj per nomshildoj. La direktoro dankis pro la vizito. Mi plurfoje insistis, ke temas pri esplorvizito. Mi skizis la strategion de la kontrakto substrekante klare, ke mi portos tiun projekton al la du estraroj kaj ke la du estraroj diskutos kaj

decidos. La etoso estis tre pozitiva kaj respektoplena.

Post la vizito de la muzeo Mirejo sugestas al la lokaj prizorgantoj jenajn pashojn:

1. Aktualigi la dokumentojn en la ekspozicio, daure.
2. Salti de 10 al 40 movshrankoj.
3. Listigi la mankantajn verkojn kaj diskonigi la liston cele al kompletigo de la havajho.
4. Zorgeme noti en la china kaj en EO chiujn verkojn, indikojn k.s. (nuntempe en div lokoj aperas nur la china lingvo)
5. Zorgeme uzi Esperanton inter la kunlaborantoj dum la laborhoroj por ebligi pli altan lingvan parolkapablon.

Se ni pripensas pri kontrakto por firmigi la ekziston de la muzeo, tia dokumento povus esti modelo por aliaj tiaj institucioj, ekz CDELI en La Chaux-de-Fonds.

La subskribontoj devus esti:

Nome de la Movado mondscale ILEI kaj UEA

Nome de la Movado china: urba klubo, provenca asocio, Landa Asocio

Nome de la Universitato: la gvidantoj (direktoro, prezidanto...)

Nome de la urbo: prezidanto

Nome de la provinco: prezidanto

Chu la shtata nivelo bezonatas, ni povos vidi poste.

Tia dokumento povus havi jenan enhavon:

## UEA kaj ILEI

1. Klopodos provizi la konservejon per sendo de nove aperintaj libroj
2. Klopodos kompetigi la stokon per provizo de mankantaj verkoj
3. Diskonigos la informojn pri la aktivecoj de la muzeo tra siaj kutimaj kanaloj
4. Flegos regulajn kontaktojn kaj divesajn kunlaborojn

## La chinaj esperantistaj instancoj

1. Provos zorgi, ke altnivelaj esperantistoj povu labori en la muzeo kaj prizorgi ghin.

## La universitataj kaj politikaj instancoj chinaj

1. metos je dispono spacon (minimume same grandan spacon kiel nun) por la muzeo sen limigita dauro.
2. metos je dispono kunlaborantojn por mastrumi kaj evoluigi la institucion.

Nun komencighas diskuto pri la taugeco de tia kontrakto kaj pri ghia enhavo.

Se ni iras tiun vojon, la subskribado devus okazi en la muzeo mem. Pro la supozo, ke smg partoprenos la ILEI-kongreson en julio 2017 en Busano, mi venas al ideo, ke la subskribado povus okazi la 12-an au 13-an de Julio antaŭ la komenco de la ILEI-kongreso en Koreio, survoje al Koreio. Smg subskribus kiel vic-prezidanto de UEA. Mi povos reprezenti la Ligon. Tio donas al ni ses

monatojn por diskuti pri la enhavo de la dokumento inter la diversaj subskribontoj.

Se ni iros tiun vojon al firmigo per kontrakto, tio bone trovus lokon en la ILEI-programo “Ni Savu Niajn Semojn”, en la Jaro de la Lernanto kaj en la Zamenhof-Jaro.

Tiu raporto, ne ankoraŭ diskonigebla vastskale, iras al

ILEI-estaro plus kun peto al smg transdoni ĝin al la estraro de UEA.

Sinjoro SUN.

Sinjoro SUN bonvolu indiki al mi erarojn kaj mankojn, kaze de bezono.

Poste la du estraroj komencos diskuti pri la propono.

Mirejo Grosjean

Prez de ILEI

Katmanduo, Nepalo, 2016-11-15